

& Unua koncerto:

< Rekante 22 el 43 batoj por strofo, entute 301 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Stanislav Schulhof (Bohemaj grenatoj) dediĉe al Otakar Březina. Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

(/Mi MiFa FaMi MiLa Lado; mi mifa fami mido doTi; Mi MiFa FaMi MiSi SiTi; re refa fami mido Ti La;

(#Rekantaĵe: Mi MiFa FaMi MiLa Lado; mi mifa fami mido doTi; Mi MiFa FaMi MiSi SiTi; re refa fami mido Ti La a)

)×7)+

(&Strofoj:

'1 /En vest' eniris li solena ; kaj la amaso eksilentis,; aeron varman li eksentis, ; en ĉambro lum' – kaj odorplena.

(×: **Memoru kion kanto diras ; dum vi en danco paŝe spiras. ; Metu la vorton en memoron ; kaj ĝin akceptu en la koron.**)

'2 Malsupre sub li en parfumo, ; veluroj, silkoj, muselinoj, ; sur seĝoj belaj sinjorinoj ; en duonombro, duonlumo.

'3 Kaj kunfandiĝas floroj, bukloj ; kun ruĝaj lipoj, molaj brakoj, ; sinjoraj vicoj – nigraj frakoj, ; fulmantaj vitroj de binokloj.

'4 Li levas jam la violonon, ; ekslnas jam vibrantaj kordoj ; kaj de piano la agordoj ; enfalas tuj en ĝian sonon.

'5 Sed majstro lia – vana gloro – ; de seĝ' foriras jen subite, ; pri debut' sia ekscitite ; li pensas nun en koridoro.

'6 Eviti volis li la voĉojn ; de l' kritikantoj kaj publiko, ; de enviema estetiko, ; aplaŭdojn, kriojn kaj riproĉojn.

'7 En ĉambron, kie tonoj sonis, ; revenas li kun velka koro. ; Ĉu iuen ĉi tiu horo ; eĉ gloron lian rememoris?)